

Kajeroj el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

La uzo de Lia kaj sia laŭ logika vidpunkto

Se don Ricardo vidus nin...



Rotara Amikaro de Esperanto

La nobela prelego
en Esperanto


Senlaboreco

**Ni estas en
La Reto!**
(Paĝo 26)

Nº 31

Julio/Septembro 1996

Kajeroj _____ _____ el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Martín Bustín Benito.**
Apartado de Correos 4143
E03080 ALICANTE (Hispanio)

Secretario: **Jesuo de las Heras Jiménez,**
Apartado de Correos 4461
E30080 MURCIA (Hispanio)

Kasisto: **José María Bernabeu Franco**
Gral. Primo de Rivera, 8
E-03369 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la n° 28.09.722.429
en libreta de Caja Postal. Oficina postal 0412. Sen aldona kosto.

Faras la Kajeron:

Provkorektanto: **José Pina Tuells,**
Administra laboro: **Juan Antonio Cabezos**
Martínez,

Redaktoro: **Jesús de las Heras Jiménez.**

Grava noto.- Kiam vi pagos
vian kotizon, sendu fotokopion
de la pagilo al S° J. M. Bernabeu,
Apartado 90, 03360 Callosa de
Segura, Alicante.

Kovrilo: isa kaj asa tempoj en Esperanto

Enhavo:

Redaktore:	3
Informoj de la Prezidanto	4
Eseo monatotria	5
Senlaboreco,	5
<i>Natura vivo:</i> Esperanta naturismo estas kreenda	7
<i>Reagoj:</i> La uzo de Lia kaj sia laŭ logika vidpunkto	8
Mortis Valo, mortis amiko,	9
<i>Lingve parolante...</i> Kastilia, la lingvo kiu neniam ekzistis	10
La Proleta Ateneo informas	11
Datreveno: Don Ricardo Codorniu y Stárico	12
Omaĝo al apostolo de l' arbo kaj Esperanto	13
<i>Debatindaĵoj:</i> K.F.D.	16
<i>Labormondo:</i> Kio okazas kiam eksterlandano volas labori en Hispanio?	18
<i>Recenzoj:</i> Laboristaj Kronikoj pri la Hispana Esperanto-Movado	19
<i>Vizito de Nobelpremiito al Murcia:</i> La Prelego	20
<i>Aliaj Anaroj:</i> La RADE (Rotaria Amikaro De Esperantistoj)	24
Ni estas en la reto!	26
La tajforegno de Murcia-II,	27
La estingisto	28

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecu la
aŭtoroj mem, ne la redakcio.*
Ni ne korespondos pri ne-pejlitaj artikoloj.
Tamen, ni klopodos publikigi ĉiujn interesajn kontribuojn.

Redaktore:

Oni diras, ke estas malfacile redakti revuon en Esperanto. Sed tio estas malvera: kio ja estas malfacila estas **dairigi la aferon!** Ĉar ni ĉiuj havas multajn okupojn kaj ĉar ni volas fari redaktadon de revuo tiel bona kiel eble ni lasas la finan punkton ĉiam por morgaŭ..., sed morgaŭ ĉiam venas, kaj la laboro estas ankau hodiaŭa.

Tial mi redankas al ĉiuj, kiuj helpis min fari la revuon: al **Giordano Moya, Cabezos Martínez, Vicente Hernández Plusera, Jean Amouroux, Isabel Acevedo, José Luis Pérez Óvilo, Olga Espej, Nicolás Gil, Rosa Onofre, Marc Levin**, kaj eĉ **Bernard Golden** kaj **Armand Delacroix**, kies kvin kunlaboraĵoj atingis nian redakcion tro malfrue por publikiĝo, sed restas por la venonta numero. Dankon al vi ĉiuj, ĉar inter ni povas fari legendan revuon! Mi esperas, ke ĉiuj, kiuj havas ion por diri dairigu sendante artikolojn al mi, ĉar kiel ni iam diris, ĝi ne estas afero por nur unu persono...

Vi trovos ĉe la sekvanta paĝo la konsiderojn de nia Prezidanto, kiu volas vekti nin, kaj poste, la zorgojn de kamarado Moya pri senlaboreco en tutmonda socio. Cabezos Martínez surprizas nin skribante pri natu-rismo, kaj Vicente Hernández reagas vigle, defendante sian mastron kaj amikon, Mimó. Poste, Jean Amouroux informas nin, ke la aŭtoro kies libron ni prikomentis lastnumere jam mortis, mabriĉa, surda kaj blinda.

Isabel Acevedo tute kredis tion, kion mi diris lastnumere pri libere esprimi siajn opiniojn, kaj ni publikigas tiun sian. Certe

estos reagoj, sed feliĉe la legantoj de nia revuo estas jam maturigitaj, kaj la venanta debato estos ideo, ne persona. Nicolao Ail informas pri la Proleta Ateneo kaj la broŝuroj kiujn vi povos legi kontraŭ malmulta mono. La plenan liston vi povos trovi je paĝoj 1^a kaj 26^a. Mi esperas, ke vi povos legi bone la titolojn, ĉar estis multaj kaj ne estis sufiĉa spaco!

De la paĝo 12^a ĝis la 15^a ni festas la datrevenon de la naskiĝo de la unua granda esperantisto de Murcia, inĝeniero Don Rikardo Kodorniu' kaj Stariko: unue informas S^{ro} Marco Botella, kaj poste Dr^o Pérez Óvilo, la UEA delegito en Murcia.

Rosa Onofre kaj Juan Antonio Cabezos dairigas siajn sekciojn, nome la **Kofedo pri Esperanto kaj labormondo**, kiu ĉi foje zorgas pri eksterlandanoj.

De paĝo 20^a ĝis 23^a ni povas legi la unuan prelegon **en Esperanto** de universitata profesoro al la ĝenerala publiko. Estas ĝi pli leginda ĉar la profesoro estas nobelpremiito, Pr^o Seltén.

Armand Delacroix zorgas pri aliaj esperantistaĵaroj, kaj sekve li skribas pri Rotaria Amikaro de Esperanto.

Kaj la plej gravan novaĵon mi lasis por la fino: **Kajeroj el la Sudo** estas en Internet. Ekde nun vi povas atingi nin —kaj sendi viajn kontribuojn— pere de ĝi. Vi trovos detalojn je la paĝo 26.

Kaj la lasta paĝo rakontas pri la muslima historio de Murcia, plume de Marco Botella. Mi esperas, ke vi trou la revuon sufiĉe interesa kaj leginda. Se ne, bonvolu skribi al mi por diskuti la aferon. :-))



Informoj de la Prezidanto

Ĉi foje mi havas la okazon komenti du gravajn eventojn favoraj al nia Asocio, kaj al la hispana laborista movado.

La unua estas la starigo de la libroservo de HALE, dank' al helpo de nia kamarado Nicolao Gil el Leono, kiu akceptis, post persona demando, respondeci pri nia libroservo. Nun por ke ĝi bone funkciu ni ĉiuj devus rilati kun nia libroservo kiam ni deziros havi esperantan materialon.

La alia grava novaĵo, kiu sendube multaj el la HALE-anoj jam konas, estas la eldono, fare de la libroservo de SAT, de la verko de kamarado Antonio Marco Bottella **Laboristaj kronikoj pri la hispana Esperanto movado**. Recenzo de tiu interesa verko jam estis farita, do, mi rekomendas al ĉiuj esperantistoj legadon de tiu-ĉi instrua verko pri la laboristaj esperantistaj eventoj en Hispanio.

Ankoraŭ foje mi alvokas ĉiujn membrojn de HALE por ke oni provu kompletigi nian komitaton. Nun vakas du postenoj: vicprezidanto kaj sekretario. Ĉu neniu el la valoraj membroj de nia Asocio akceptos doni iom da tempo por ke la fragila strukturo de HALE povu pli firmiĝi? De ni ĉiuj dependas la vivo de nia Laborista Esperanto Asocio.

Nia poresperanta laboro ne estas tre fruktodona. Mi sciis nur pri la du kamaradoj kiuj instruas en sindikatejoj de Madrido kaj Leono kun pli aŭ malpli sukcesaj atingoj. En Alikanto, urbo en kiu mi loĝas, mi povis pasintjare starigi Esperanto-kurson el kiu nur unu lernanto finis. Ĉijare miaj klopodoj por daŭrigi la instruadon estis vanaj ĉar mi fiaskis. Mi esperas, ke estonte mi trovos pli favorajn cirkonstancojn por daŭrigi poresperantan laboron.

Nur tri respondojn mi ricevis pri la demando kiu faris la sekretario de la LEA komitato pri la akcepto aŭ malakcepto de Esperanto Nederlando kiel LEA-o en sia lando. Malgraŭ ke ĉiuj membroj estis informitaj, la rezulto estis vere malkontentiga. Ĉu iam ni vekiĝos?

Kamaradece al vi,

Marteno

Eseo monatotria

Senlaboreco,

de Giordano Moya



Senlaboreco aŭ subdungiteco estas socia fenomeno propra de nia meĥanika epoko. Antaŭ du jarcentoj kaj duono, kiam naskiĝis la industriiĝo en Britio, la ekonomio estis agrokultura kaj oni ne konis la senlaborecon. Se pro plimultiĝo de la loĝantaro ne estus sufiĉa grundo, oni elmigris aŭ kiel en Svisio soldatiĝis.

Antaŭ la industria epoko la konsumado estis limigita de la produktado. La produktado ordinare estis malplikvanta ol la necesa konsumado. La ordinara vivnivelo estis malalta, sed laboro ne mankis. La muskola kapablo de la homo estas tre limigita kaj eĉ tiuj de tirbestoj.

La malkovro de la vapormaŝino, sekvata de la elektra energio provizis fortojn antaŭe eĉ neimagineblajn, kiuj aplikataj al la industrio permesas kvantan produktadon superan al la necesa aŭ al la aĉetpova.

Nuntempe pro la cibernetiko fariĝas ebla la aŭtomatiĝo de la maŝinaro kaj kompreneble estas bezonataj malmultaj laboristoj por la sama produktado. Tiu fakto, sen antaŭjuĝoj konsiderataj devus esti ĝojiga, ĉar neniam antaŭe okazis tiu ebligado de produktado. La homo, en la historiaj tempoj, ĉiam estis katenita al la laborado kaj ŝvite devis subteni sian vivadon. Tamen tiu bonŝanĉo estas

hodiaŭ unu el la precipaj faktoroj de socia krizo. Kiu restas sendungita falas en mizeron kaj alie se la laborloko ne estas stabila, la vivado fariĝas nestabila, kaj la bonsorto en la estonteco eventuala.

Estas evidenta kontraŭaĵo inter la interesoj de la entreprenoj kaj de ties laborantoj. Se la entrepreno ne disvendas sian produktaĵon, ĝi ne povas konservi la laboristojn, ĉar pli frue aŭ malfrue la entrepreno bankrotas. Kiel aranĝi la problemon? En parto ĝin solvis la bonfarta socio. En la plej industriaj landoj nur malmulta parto el la laboristoj okupiĝas en la produktado de varoj, eĉ en la agrokulturo. La plej granda kvanto da laboristoj okupiĝas en servoj. Alie la tekniko estas ĉiujare plej grava en la produktado. La industrio, kiu tuj palikas teknikajn novaĵojn prosperas, kiu sekvas rutinon bankrotas. En tiu linio de progreso la instruado fariĝas pli necesa ol la laborado. La scienca instruado, el kiu devenas la tekniko, povas esti en la estonteco la plej vasta okupo de la homoj kaj laŭ nia opinio fariĝas necesa la humanisma lernado por ebligi pacan kaj solidaran kunvivadon en socio pli klera.

Oni diras, ke la bonfarta socio jam ne estas subtenebla, sed se la senlaboruloj laborus, jes! Okazas, ke

oni devas subteni la bonfartan socion kaj plie la senlaborulojn, kiuj estas forigitaj de tiel nomata bonfarta socio.

Ankaŭ okazas alia kontraŭaĵo, la laboro ĉiam fariĝas pli rapida kaj enua, precipe por multaj katenitaj al ĉenlaboro.

Se nuntempe la senlaboreco atingas la dudek procenton de la laboristaro en nia lando, estas videble ke laborante ĉiuj 20% malpli, oni povus okupi tiun 20% da sendungitaj kaj eĉ pli. Tamen, oni ankaŭ devus redukti la salajron 20 procento, sed tiu solvo estas konsiderata ne akceptebla. Alia solvo estas produkti kaj vendi 20 procento pli ol antaŭe, sed en ekonomio de merkato ne eblas en unu sola lando. La akordo devas esti ĝenerala kaj internacia, kaj la sindikatoj ankoraŭ restas naciaj.

La afero ŝajnas facile solvebla, sed en la praktiko ne estas tiel facila. Nuntempe ĉiu lando ne povas esti aŭtarkia, oni revenos al pasintaj mizeroj. Ankaŭ oni ne povas apliki ekonomiajn reformojn por solvi la subdungitecon kaj humanigi la sociajn diferencojn se ne estus aplikataj tutmonde. La konkurenca merkato devigas produkti almenaŭ samkoste kaj eĉ pli malkoste por konkuri novajn merkatojn.

Inter la sociaj reformoj la plej urĝaj estas la distribuado de la laboro por solvi la senlaborecon kaj eble la civitana salajro por sekurigi la bonfartan socion. De naskiĝo ĝis forpaso certa salajro. Ĝi helpas la gepatrojn kaj ebligas longan studadon, ĝi sekurigas la familion kaj la

maljunecon kaj evitos la mizeron. Tio estas ebla per la cibernetika aŭtomatiĝo de la industria produktado kaj tiel same en la agrokulturo.

Oni antaŭvodos la neceson de libera traĵo en la tuta mondo de ideoj, personoj, varoj kaj kapitaloj. El tiuj kvar faktoroj nur la kapitaloj trairas ĉiujn landlimojn. Ankaŭ la komerco tutmondiĝis, sed la konkurenca merkato en malsimilaj kondiĉoj de produktado ne nur generas nestabilecon de laborlokoj, sed eĉ en la propraj entreprenoj, ili ankaŭ povas bankroti kun la sekva sendungado.

La dinamisma kapitalismo en Eŭropo klopodas por la Eŭropa Unuiĝo, ĉar sen ĝi Eŭropo dekadencus ekonomie. Dume la sindikatoj restas naciaj. Se estas necesa eŭropa komuna mono des pli estos necesaj komunaj eŭropaj organizoj. Baldaŭ la naciaj sindikatoj taŭgos por nenio. Se ankoraŭ ne estas atingeblaj tutmondaj organizoj, almenaŭ ĉi tie en Eŭropo ili devas eŭropiĝi.

La subdungiteco kaj aliaj sociaj reformoj estas neeblaj laŭ naciaj kadroj kaj eĉ en eŭropaj kadroj. Se la financoj tutmondiĝis, ankaŭ devus tutmondiĝi la kondiĉoj de laborado kaj la bonfarta socio.

La mondo fakte tiel malgrandiĝis, ke ĝi fariĝis kiel unusola granda vilaĝo. Necesas pensi kaj agadi laŭ tiuj novaj cirkonstancoj. Ankoraŭ regas naciaj ŝtatoj, ankoraŭ restas naciaj kaj lingvaj baroj. Per la angla, la financistoj solvis sian lingvan problemon. Kion pensas la laboristoj?

Estas necesa ĝenerala kulturaliĝo por mense kompreni la tutmondiĝon kaj en tiu sama skalo agadi. La esperantismo devas alporti tiun mondrigardon, kiu samtempe impulsos Esperanton kiel supernacian tutmondan lingvon.

Natura vivo

Esperanta naturismo estas kreenda

Unue mi klarigas por eviti miskomprenon, ke krei tian naturismujon devas signifi malpliigon de la suvereneco de la ekzistantaj ŝtatoj: provizita de propraj policoj, estraroj, impostsistemojn, ktp. Kion mi deziras estas la kreo de spaco kie ni, la E-naturismanoj kaj INOE-anoj povus realigi niajn ideojn.

La Islamo havas sian Mekon, la katolikismo sian Vatikanon, ni, la natursimanoj devas havi nian naturismujon. Kial? Mi klopodos tuj klarigi ĝin. Jen la ekspliko.



En Eŭropo ekzistas la F.N.I., kiun konsistigas la naturismaj federacioj de la eŭropaj landoj, ĉiu federacio nacia havas siajn klubojn kaj kelkaj el tiuj kluboj havas siajn proprajn instalaĵojn por la praktikado de la naturismo. Tamen, ne ĉiam la kluboj posedas proprajn instalaĵojn, pro tio aperas la fenomeno de la natursimaj strandoj tiel, ke ĉiuj ajn povas praktiki la naturismon. El tiuj strandoj, kelkaj estas rajtigataj, dum aliaj ne.

Tiuj lastaj estas ejoj kie iuj homoj praktikas la naturismon senpage. La rajtigataj strandoj naturismaj estas ekspluatataj de entreprenoj kampingaj aŭ hotelaj. Nu ekzistas kvar klasoj de naturismanoj:

- a. La homoj kiuj estas organizigintaj kaj pagas por la praktikado de la naturismo.
- b. Tiuj, kiuj nek apartenas al iu ajn

organizajo, nek pagas por siaj praktikoj.
c. Tiuj, kiuj apartenas al neniu organizajo sed ĝuas la kampingojn kaj hotelojn, kvankam kontraŭ pago de pli da mono al tiuj apartenantaj al la klaso a. Ĉi lasta profitas rabatojn.

La du unuaj klasoj preskaŭ plene jam solvis siajn praktikad-problemojn, tamen, restas nesolvita la problemaro de la lasta grupo. Kiuj estas la solvoj por ĉi grupo? Evidente, utilas ankaŭ por ĝi la samaj solvoj aplikitaj de la tri unuaj grupoj, sed ekzistas ankaŭ alia solvo.

Nuntempe, ĉio estas komerce ekspluatata. La kapitalismo profitas ĉion: la privatan vivon, la sekurecon, la naturismon, ktp.

Ignori ĉi fakton estas vivi aparte de la historia momento. Tial estas necese krei entreprenojn celantajn:

1. Krei naturismajn spacojn kie krome oni povas diskonigi Esperanton.
2. Profiti la apogon de la naturismanoj per la disdonado de entreprenprofitoj.

Tiacele mi opinias, ke ni, en INOE, disponas de ampleksan gamon de gekapabluloj por formi komisionon de 3 aŭ 5 membroj por trankvile pristudi la eblecojn de sukceso pri naturismuja entrepreno pritaksante la eblajn lokojn, kapitalon, ktp.

Juan A. Cabezas Martínez

Reagoj:

La uzo de *Lia* kaj *sia* laŭ logika vidpunkto

En respondo al la argumentado de Akademiano Bernard Golden pri la apliko de la E-refleksivo, argumentado aperinta en la rubriko *Lingve parolante...* de *Kajeroj el la Sudo*, aprilo/junio 1996 —similan replikon mi jam faris pasintjare en la periodaĵo *KAE-informilo* n° 12, publikigita en la urbo Sabadell—, mi unufoje ekstrakte ripetos, kiel simpatianto de la tiel nomata *Analiza Skolo*, mian kriterion rilatan al atiu komplika temo.

Unuavice mi diru, ke Sr° Golden ial forgesis mencii, en sia artikolo, la aŭtoritatan informon de la Akademio de Esperanto, kiu institucio, jam en la jaro 1971, oficialigis tiun liadire Mimoisman regulon pri la refleksiva pronomo-adjektivo. Sekve, ne estis s^{mo} Luiso Mimó Espinalt, kiu la unua precizigis aŭ reviziis tiun gramatikan punkton, sed ja la propra Akademio de Esperanto, kiu tiujare diskonigis jenan gvidan tekston: *II Foje la vera subjekto lasas vidi sin per enmeto de la vortoj kiu(j) est- ekz. apozicioj adjektivaj aŭ substantivaj provizitaj per komplemento (ekz. kastelo fama pro sia historio; sed li ekvidis sian fraton Benjamenon, la filon de lia patrino= B., kiu estis la filo de...).*

Analogaj ekzemploj, ĉiuj same Zamenhofaj kiel tiu de la Akademio, estas troveblaj en la verkoj *Plena Gramatiko de Esperanto* kaj *Komplementa Volumo de Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto*, ili nome estas *Li trovis la leteron de la kamarado de lia filo* (kies estas la kamarado?) *La popolo ne turnis forte sian koron al la dioj de ĝiaj patroj* (kies estis la dioj?, kies la tribo?) *En la tria jaro de lia regadoli faris festenon por ĉiuj siaj parencoj.* (De kio estis la jaro?)

Estas do evidente, ke ĉiuj tiuj zamenhofaj ekzemploj, kies posedan adjektivon mi substrekis, aperas konformaj al la normoj kaj de la Akademio de Esperanto, kaj de la bedaŭrata esperantologo Luiso Mimó Espinalt.

Krome S° Golden ree kritikis la frazon ... *li estis gvidata nur de lia eksterordinara lingva intuicio (ne institucio!), t.e., de lia logika sento, sur kiu baziĝas la majstrecio de lia stilo.* Ja estas

La verko Komplementa Volumo de Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto konsistas el du libroj, kiuj estas aĉeteblaj ĉe la Libroservo de Hispana Esperanto Federacio.

konjekteble, ke en tiu ĉi frazo —aperinta en la *KAE-Informilo* n° 9— nur taŭgas la apliko de la poseda adjektivo *lia* ĉar la formo *sia* estas ne funkciebla kiel subjekto. Apoge al tiu kriterio, mi refoje citu la verkon¹ *Komplementa Volumo de Kompleta Lernolibro de Regula Esperanto*, kie sub la titolo *Refleksivo en pasivo* tekstas kene: *en pasivo, refleksivo rilatas ne al propozicia subjekto, sed, en ne rektaj aŭ cirkonstancaj komplementoj dependaj de la pasiva verbo, al la aganto d ela pasivo mem, kiu funkcias kvazaŭ dua subjekto, t.e. oni neniam povas diri -ita, -ata aŭ -ota de sia -o, aŭ de si.* Tion cetere pravigas la konstatebla simetrio inter la sekvaj ekzemploj, ĉiuj samasencaj en pasivo kiel en aktivo, nome: *Ŝi sentis sin freneze brakpremata de ŝia kuzo = Ŝi sentis, ke ŝia kuzo freneze brakpremis ŝin. Petro respondis tion pelante de lia delikateco = Lia delikateco pelis lin. Ŝi deziris matene ne esti ĝenata de ŝiaj amikoj = Ŝi deziris, ke ŝiaj amikoj ne ĝenu ŝin. Li povas esti savata nur pere de lia onklo = Oni povas savi lin nur pere de lia onklo. Tiu hundo estis donita de ĝia mastro al sia najbaro = Ĝia mastro estis doninta tiun hundon al sia najbaro. Kaj tiel, plu. Kiel ni jam rimarkigis, aparte de tio, ke la refleksivo *sia* ne povas funkcii kiel subjekto, kio plej frape konvinkas, el tiuj pasivaj ekzemploj, nome estas ilia pluan konformeco kun la respektiva aktivo, kion ĉiuj gelegantoj povas mem kontroli helpe de la ekvivalenta signo.*

Fine, kaj reage al la cetere senbaza kondamno, farata de S° Golden, kontraŭ la logikohava lingvaĵo de prestiĝa esperantologo hispana, la jam forpasita K^{do} Luiso Mimó Espinalt, mi transkribas tiurilatan rekomendon de D° Zamenhof, kiu racie konsilis, al la tuta esperantistaro, agi laŭ jena neapelaciebla instrukcio: *En lingvo arte farita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis.* Tiun ĉi zamenhofan rekomendon ja rigore obeadas la strebantoj por perfekta, senerara Esperanto, kiujn S° Golden nomas Minoismanoj.

Vicento Hernández Llusera



Mortis Valo, mortis amiko,

Mortis la multŝatata saĝulo, kiel rememoraraj kaj opiniaj *Vortoj en Laŭte* altiris kaj katenis la legantojn. La stilo kaj la vortoj estis simplaj, la lingvaĵo senproĉa kaj la temoj cerbumigaj ĝis la alto de filozofio.

Kiam li estis 75-jara venis al Valo la deziro retrorigadi en la spegulo de la travivita tempo, ne pro nostalgio, sed ĉar la forto de imago estis por li la neanŝtataŭebla radifonto por la pluvivo de la *arbo maljuna, en malfrua aŭtuno...*

Tiel aperis, eldone de *Laŭte*, la unua kajero, plurfoje reeldonita, de lia membiografio, la leginda *...El la kara infaneco*, kiel vivokadro situas en Aleso kaj en Florako. Sekvis la tri pliaj kajeroj: *Kontraŭflue, Sepdek jaroj sub la verda stelo*, kaj *Migrante tra metioj*.

Samkolekte aperis liaj tradukoj de verkoj i.a. de Ja Runer kaj de *Poemo de Rodano*, de Frédéric Mistral al li tre kara.

Siatempe Raymond Schwartz ofte vokis la kroman talenton de Raymond Laval por karikature ilustri siajn verkojn kaj la satiron *La Pirato*.

Raymond Laval aliĝis al SAT en 1934 kaj estis dum jaroj sekretario de ties Literatura Komitato. Liaj recenzaj kaj verkaj kontribuoj ne malofte pliriĉigis *Sennaciulon* kaj *Sennaciecan Revuon*.

Neniu, kiu sin turnis al li, ĉu por peti klarigon, konsilon aŭ opinionon, ĉu por lin kontraŭdiri, povis plendi, ke li ne ricevis klaran kaj detalan respondon, ĉiam ĝentilan kaj tolereman, sed firman.

En la 1980^{aj} jaroj la grupo de Nimo kaj *Sudfranca Stelo* havis la privilegion ĝui la eminentan lingvoscion de Valo.

Ne nur li estis ĝismedola esperantisto (lia diplomo *Atesto pri Kapableco de Esperanto* datumiĝas la 11^{am} de julio de 1914), sed li estis simpla, bonkora kaj fieris, ke li daŭre estas kaptita de la zamenhofeca idealo.

Kiam li tute blindiĝis, kun la kara edzino ili forlasis Nimon kaj loĝis en Avinjono ĉe rezidejo por maljunuloj. Tie ambaŭ mortis.

Esperanto-verkemo ne forlasis lin eĉ ne kiam estis nepre necese amputi lian maldekstran kruron.

Li povis nek legi, nek skribi, nek bone sidi aŭ kuŝiĝi. Li krome estis surda. De kiam mortis la tiom amata edzino Ivona io pli rompiĝis en la koro de Valo. En Avinjono nia samideano André Gente peris al Valo, kio mankis al la kriplita korpo. Valo povis tiel pluri la esperantistan vojon celitan kaj, ĝis la lasta momento, pluaperis *Vortoj de Valo en Laŭte*.


La 18-an de marto ĉesis bati la nobla koro, tre verŝajne dum siesto. La senviva korpo estis transportita al la medicina fakultato de Montpellier. Al la morto jam de longe li estis preta. Du tagoj antaŭ la elmondiĝo estis ekspedita *Laŭte n^o 122* de marto/aprilo 1996. Ĝi enhavas du tekstojn de Valo, kiujn, kiel kutime, peris André Gente: *Pensi en Esperanto*, lasta omaĝo al lia senkondiĉa modelo, Lanti, kaj *Funebro kaj rido*, temo kiun li plurfoje serene pritraktis.

Skribante tiujn ĉi liniojn, mi konfesas, ke funebras mia koro, kaj mi tute ne emas al rido. Al tiuj kiuj ne bone konas la penson de Raymond Laval, mi sugestas legi *Vortoj de Valon*, kiun *Laŭte* ĵus eldonis broŝurforme.

Jean Amouroux

Lingve parolante...

Kastilia, la lingvo kiu neniam ekzistis



Kiam mi parolas pri lingvaj aferoj kun amikoj hispanaj el diverslingvaj partoj de Hispanio aŭ esperantistoj el diversaj landoj, mi mire aŭdas preskaŭ ĉiam pri la *kastilia* lingvo. Tre ridinde, kiam mi aŭdas la samajn personojn paroli angle, ili ĉiam parolas pri la *Spanish*, ne la *Castillian*, kiu tute ne ekzistas.

Mi ne volas kreskigi akran senton ene de la koro de naciemaj hispanoj, sed mi opinias, ke oni devas paroli ĉiam tiel korekte kiel oni povas. Do, jen estas mia analizo de la problemo.

Oni parolas pri *la franca* aŭ *la itala*, ĉar ekzistas Francio kaj Italio, tio estas, la landoj de la francoj kaj de la italoj. Oni parolas pri *la angla*, ĉar Anglio estis la plej grava lando de Britujo, kaj ankaŭ kie la lingvo naskiĝis. Same okazis pri *la germana*, kiu estas la lingvo kiun parolis la germanoj antaŭ ekzistis Germanio.

Sed neniam iu kastelo estis persono. Ne ekzistis Kastilio, t.e., la lando de personoj nomitaj *kastiloj*. Ekzistis **Castilla** (pron. kastiĝa), tio estas: lando de kasteloj. Sed kasteloj estas konstruaĵoj, ne personoj. Nederlando estas -oni diras- lando de mŭelejoj, kaj eĉ se oni povos nomi ĝin *Mŭelejlandon*, oni ne rajtus diri *Mŭelejio-n*, ĉar *mŭelejoj* ne estas personoj. Aŭ jes?

Sed oni konsentu, ke kasteloj parolas, ke kasteloj estas homoj, kaj ke kasteloj havas lingvon apartan, belsonan kiu tute koincidas kun la hispana. Eĉ tiukaze, oni ne rajtas nomi ĝin *kastilia*, sed *kastela*, ĉar oni ne

diras *francia*, *anglia*, *germania*, *ĥinia* aŭ *arabia*, sed **franca**, **angla**, **germana**, **ĥina** kaj **araba**. Ili stas adjektivoj el la parolantoj de tiuj lingvoj, ĉar tiuj adjektivoj difinas la lingvojn, kiujn tiuj difinaj homoj parolas.

Kiam la hispana lingvo naskiĝis, ne ekzistis Hispanio, vere, kaj kvankam oni ne povas scii kie homo ekparolis nian lingvon, la unuan skribaĵon hispane verkita oni trovis en San Millán de la Cogolla (pron. san miĝan' de la kogoĝa), kiu ne lokiĝas en la aktuala regiono de Castilla (kastiĝa), sed La Rioja (pr. la rjoĥa). Laŭ tio, oni devus paroli pri *la rjoĥa*, ne la kastela, kastilia aŭ eĉ la hispana! Ankaŭ, kiam la hispanan oni ekparolis, en la hodiaŭa Hispanio nek ekzistis hispanoj, nek katalunoj, nek galegoj, ne vaskoj, nek *ceteruloj*, sed kaj muslimanoj kaj kristanoj. Se tiuj unuaj parolis la araban, ĉu oni povas diri, ke tiuj lastaj parolis *la kristanan*?

Mi agnoskas, ke kelkajn el miaj proponoj oni povas konsideri ŝokemajn aŭ almenaŭ bizarajn; sed ne pli ol la *kastilia* konsento, kiun mi preparolas en mia artikolo. Mi serioze proponas, ke Esperanto sekvu -kiel kutime- la interkonsenton eltiri siajn plej ofte uzatajn vortradikojn el la plejkvanto da lingvoj. Se oni diras *isbaania*, *espagnol*, *espanhol*, *Spanish*, *Spanisch*, *spagnuolo*, kaj tiel plu, sed ne *castellain*, *castelao*, *Castillian*, *Castilisch*, referante al nia gepatra lingvo, bonvolu ni ne renomigu ĝin, kaj lasu politikajn aferojn por politikistoj!

Isabel Acevedo

La Proleta Ateneo informas

Danke al la streboj de la nuna HALE-prezidanto, oni starigis fine la HALE-libroservon. Komence, la stokon da libroj konsistigas eldonajoj de SAT-broŝurservo, sed ni eklaboras jam por pligrandigi ĝin. Kvankam la stato de la libroservo estas tre provizora kaj modesta, oni volas entrepreni seriozan laboron por kiu ni havas jam projektojn.

La adreso de la HALE-libroservo estas:

Poŝtfako 305
24080 LEONO
(HISPANIO)

Kaj ties konto por pago de la mendoj estas ĉe la Poŝta Ŝparkaso, je la nomo de K^o Nikolas' Gil, nombro 29-85.039.477.

Krome, la *Proleta Ateneo* peras abonojn kaj monkontribuojn por la gazetoj *Leberacana Ligilo* kaj *Ĝisdatigo*. Kamaradoj turnu sin al la sama adreso.

La *Proleta Ateneo* pro ties liberecana karaktero kunlaboras kun liberecanaj kaj anarhisindikatismaj organizoj. Tial ĝi starigis Esperanto-informservon kiu tradukis ĉu esperanten ĉu hispanen por diversaj jurnalaj. Precipe la ĵurnalo CNT eldonis diversajn informojn senditaj de la germana FAU, kiu eldonas la Esperantan bultenon *Ĝisdatigo*. Ni volas daŭrigi tiun interesan laboron kaj instigas ĉiujn helpi nin.

Fine, ni ricevis peton de gejunularo kiu troviĝas en malfacila situacio. Tiuj genjunuloj okupis domon en urbo Lafelgero (La Felguera), Asturio, por loĝi kaj utiligi ĝin kiel Sociala Centro. Inter la projektoj elstaras la intenco lerni Esperanton (ili jam komencis klasojn) kaj fondi bibliotekon. Sed mankas ĉio kaj jen estas la problemo. Ni proponas, ke se ci, kamarado, havas malnovan lernolibron, gazetojn, publikigaĵojn, sendu ĝin al ni kaj ni peros ĝin por la Kolektivumo *La Vejno*. Ili kaj ni antaŭdankas.

Nikolas Ail

Mendkodo

BROŜUROJ DISPONEBLAJ

Titoloj (aŭtoroj)	Pesetoj
Aa. La antaŭvenantoj de Anarhiismo	100
AA. La Aperoj de Ahasvero (Han Riner)	750
AL. Alvoko al la homa konscienco	250
AP. Amo per proverboj (Azevedo)	50
AT: Kial mi estas ateisto (Lorulut, tr. Valo)	750
AU. Al unu lingvo por Eŭropo? (Fettes)	125
BP. Legendo pri la bela Pekopeno (Hugo)	375
CM. Civila Malobeemo (H.D. Thoreau)	250

ĈS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti)	200
DI. Kiel diri.? (Lentaigne)	750
EA. Esperanto in 24 pages (anglilingve)	75
EL. Elektaj de tekstoj de Bakunin	250
ES. Por ekologia socio (Murray Boochin)	375
ET. Etiko I (Kropotkin)	375
EV. Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti)	175
FA. Konstrui fajron (Jack London)	125
FF. La Fortoj de la Fortaj (Jack London)	125
FV. Fronte al la vivo (Krishnamurti)	250

...Daŭrigas je la paĝo 26

Datreveno:

Don Ricardo Codorniú y Stárico

(pron. rikardo kodornju' i stariko)

Je la sesa de julio estas la cent kvin deka datreveno de la naskiĝo de S^o Ricardo Codorniú y Starico, nomumita la apostolon de l arbo, ĉar li klopodis kaj atingis la rearbarigon de Sierra Espuña, montaro apud la Murcia urbo. Tial oni povas vidi monumenton al li ĉe la Placo de Santo Domingo, je la centro de la urbo sub ombro de granda arbo.



Kaj al tiu bona homo ni devas laŭdi pro alia afero. Ni aŭdu kamaradon Marko Botella pri li:

Arbara inĝeniero, unu el niaj plej elstaraj pioniroj, li eble jam esperantistiĝis kun la komenco de la jarcento. Kiel inĝeniero pri arbaro li planis kaj direktis la rearbarigon de Sierra Espuña kaj skribis plurajn verkojn. Li disvastigis la amon al arbo inter esperantistoj, ĉu landaj ĉu eksterlandaj. fondis Esperantan Societon de Murcia en 1902, kaj ankaŭ en 1903 li estis kunfondinto de la **Hispana Societo por propagando de Esperanto**, la unua tutlanda hispana esperantista organizaĵo, kies unua Prezidanto li estis.

Li kunlaboris en multaj Esperantaj gazetoj kaj funkciigis plurajn rondirantajn Gazetojn, kies ĉefa celo estis praktikigi Esperanton al la tiamaj esperantistaj izoluloj.

Li estis membro de la Scienca Akademio, prezidis kun Zamenhof Universalajn Kongresojn, kaj sia prestiĝo kiel honesta homo kaj granda idealisto estis tiel granda, ke ĝi

preterpasis niajn landlimojn kaj estis ĉie respektata. Dum jaroj kaj jaroj li estis Honora Prezidanto de la H.S.p.p.E., kaj oni devas konsideri lin kiel sendiskutan apostolon de Esperanto en Hispanujo. Li verkis: *El Esperanto* (1903); *Importancia de la adopción de un idioma auxiliar* (1908: Graveco de adopto helpan lingvon); *Cómo influirá un idioma internacional en el progreso* (1911: kiel internacia lingvo influos en la progreso); *Bonifacio Sotos Ochando* (1914); kaj li tradukis lernolibron de Saint Loup *El Esperanto en dos lecciones* (1902).

Ricardo Codorniú multe influis la intelektajn kaj oficialajn mediojn por ke Esperanto estu respektata kaj alte taksata en nia lando kiel celo praktika kaj ankaŭ kiel homama idealo.

Antonio Marco Botella,
Analoj de la esperanta movado en Hispanujo,
II^a volumo, (1987 paĝo 738).

Omaĝo al humanisto el Murcia, Sr^o Codorniú, apostolo de l' arbo kaj Esperanto

*Parolado de D^o José Luis Pérez Óvilo, Delegito de UEA ĉe la Salono de ŝparkaiso CAJAMURCIA (30-V-96) okaze de la prezento de la libro **El viejo árbol**¹ (La olda arbo: Vivo kaj verko de Ricardo Codorniú).*



Kiel delegito de U.E.A. kaj nome de la *Asocio Ricardo Codorniú* /rikardo kodornju'/ de Murcia, volas mi dediĉi du rimarkigojn al tiu ĉi eminenta kaj nepri-diskutinde grava murciano, ĉu nacie ĉu internacie.

Sinjoro Ricardo Codorniú estis pioniro en Murcia, Hispanio kaj Eŭropo pri tio, kion nuntempe nomiĝas *ekologio*. Sed la kialo ne estis lia kondiĉo de elstara inĝeniero pri montoj, ĉar por atingi ĝin necesis la inspiro, tiu inspiro kiu turnas minoritatumoj en boneguloj, kaj Sr^o Codorniú havis tiun inspiron post pripensado. Li komprenis perfekte la gravecon de la medio por la homoj, kaj ke prizorgi kaj droloti ĝin estas nepra kondiĉo por la homa postvivado. Tiu ĉi rezonado gvidis lin al sia granda tasko: la rearborigo de montaro Espuĥa / espuĥa/, pulmo de Murcia kiun ni ĉiuj ĝuas nune. Tial li estis konata kiel *Apostolo de l' arbo*. Kiam en 1899 kreiĝis en Anglio kaj Germanio la unuaj asocioj por la protektado de l' birdoj, jam en Murcia S^o Ricardo Codorniú laboris pri ekologio.

Ekzistas dua punkto, konsekvenco de l' antaŭa, ke persono kiu prizorgas la naturmedion de l' homoj nepre estas iu kiu kredas je la homoj, tial li estiĝis humanisto. Sed humanisto pripensas aliajn problemojn de la homoj, kaj S^o Ricardo Codorniú faris ĝin rilate al la plej

evidentan, tiun de la lingvan nekomprenon: baro kiu disigas la homojn ekde la bibliaj tempoj de Babelo. Dirite kaj farite, same kiel li konkludis la gravecon de l' arboj kaj ekagis arbarigi montaron Espuĥa-n, li agis rilate la lingvan problemaron, ekagis por savi la gigantan baron kreitan de la diversaj lingvoj kaj enkondukis la Internacian Lingvon Esperanton en Hispanio pere de Murcia. Tial oni agnoskas lin kiel Patro de la hispana esperantismo.

Ĉi tie li kreis la unuajn grupojn de Esperanto en Hispanio (en Murcia, Águilas, Lorca, Cartagena, Los Dolores. ktp.) La 1-an de septembro de 1902, la esperantistoj renkontiĝis en Murcia fondante la *Sociedad Española para la propaganda del Esperanto* (hispana socio por la propagando de Esperanto), nomante kiel prezidanton al S^o Codorniú. La asocio fiksis sian oficialan sidejon en Murcia, Paseo del Malecón, litero C.

En Hispanio S^o Codorniú fondis kaj regule eldonis diversajn revuojn: *Vaga Stelo*, por eksterlandanoj; *Hispana Stelo*, por hispanoj; *Murcia Stelo*, por la esperantistoj el Murcia; kaj *Arbara Stelo*, por inĝenieroj pri montoj. La steloj de Codorniú atingis famon, ĉu en Hispanio, ĉu fore de ĝi.

En la somero de 1905 okazis la 1^a Monda Kongreso de Esperanto en Francio, kaj tie S^o Codorniú estis nomata kiel konsilanton de la Komitato Konsilia pri Lingvaj Aferoj. Tiujare la murcia Asocio

¹**Trovebla**, *hispane*, ĉe murciaj librovendejoj kaj la aŭtoro mem, Enrique Morales: Pza. Carlos III, 2-1^oB;



Don Ricardo, kiel ekdeziĝulo

ekeldonis sian propran ĵurnalon, **La Hispana Esperan-tisto**, kun S^o Be-navente kiel re-daktoro, kiu aperis sur la centraj paĝoj de la se-majna ĵurnalo **Murcia** pri Scien-coj, Literaturo kaj Arto, kaj kies sidejo troviĝis en strato Sociedad, 14, de Murcia. Ankaŭ li verkis por la ĵurnaloj **El Liberal** (la liberulo) kaj **Eco de Cartagena** (la eĥo de Kartaĥeno).

En 1907 estis nomata kiel prezidanto de l' Grupo de Kartaĥeno S^o Roca, kaj en tiu ĉi urbo komencis esti instruataj kursoj de Esperanto ĉe la *Centro por Ĝeneralaj Studoj* ĉe la *Lernejo de Kvar Sanktuloj* kaj ankaŭ ĉe la kvartalo de *Sankta Lucia* kaj *Los Dolores*.

Eble la plej grava fakto okazis en 1909 pro la V^a Universala Kongreso de Esperanto en Barcelono. La honora prezidanteco estis akceptata de la Reĝo de Hispanio, Alfonso 13^a, kaj la Komitato konsistigis la Princo Carlos de Borbón, diversaj ministroj, la Rektoro de la Universitato kaj la urbestro de Barcelono. S^o Codorniú oficiale komunikis, ke la Reĝo estis nomanta kiel Komandonon, kaj donanta Kolĉenon de la ordono de Elizabeto la Katolika al D^{ro} Zamenhof, kaj du jaroj poste, en 1911, li informis, ke pro reĝa ordono de Alfonso XIII^a, oni donas al Esperanto la konsideron de *Merita Lingvo* en la Hispana Ŝtato. En tiu sama jaro S^o Codorniú publikigis du verkojn: La *Graveco Adopti Helpan Idiomon*, kaj *Kiel influos Lingvo Internacia en la Progreso de la agrikulturo, industrio kaj komerco*.

Post plurmonata serĉado trafis min el Nederlando la libro publikigita en 1926 de la prezidanto de HEF, generalo Julio

Mangada, sub la titolo *Pri Hispanio, Popolkantaro de Murcia*. En sia antaŭparolo, generalo Mangada dediĉas poemon al la humanisto S^o Codorniú, kiu finas tiel:

SCIU:

De Ricardo Codorniú
Jes, de lia la animo
Dolĉa milda la esprimo
Estus ĝi, kaj ne sopiro
De l' fervora Homamanto
Kaj fidela Pioniro
De la lingvo Esperanto.
La murmuro de la vento tra l' folioj,
Kantoj de la birdoj; de la akvo, plaŭdo
Ĉe la rokfluejoj, estas harmonioj
Grandiozaj kaj entuziasma laŭdo
Pri la vivo de l' inĝeniero fama,
Kiu, familien, estis la modelo;
Por la Kolegare, nobla kaj homama,
Preta ĉiam por hompliboniga celo.
Homoj, birdoj, arboj kaj plantoj,
bonon ŝuldas lin;
Kaj dankemaj, kvazaŭ preĝoj, estu kantoj,
Ĉar jam lin forportis la DESTIN'!

Pefekte mi scias, ke tiu ĉi ne estas la nuntempa parolstilo. Jen parolekzemplo el la XIX^a jarcento kaj komenco de la XX^a. Ĝi estas la stilo de Tolstoj kaj de la elstarj idealistoj kiuj kredis je la homaro. La hodiaŭa lingvaĵo raportas pri la *inflacio, monoprezo, la 1+D* kaj tiu de la *konkuranteruloj* kiuj svarmas ĉie ajn. Sed tiu ĉi parolŝanĝo ne ŝuldiĝas ekskluzive al cent jaroj pasintaj, sed al la malapero de l' idealoj, kaj kiam la idealoj pereas, stariĝas la turpa lingvaĵo kaj la kulturo de la mono.

Ne ekzistas iu ajn dubo pri ke la grupo de Esperanto *Ricardo Codorniú* estas la plej antikva



Maljunula don Ricardo

kultura asocio de Murcia, ĉar oni povas retroiri en la tempo por trovi ĝian sid-ejon en 1902 ĉe la Paseo Malecón, litero C. Kaj mi tute ne rilatas sportan-kulturan-folkloran asocion, sed al iu strikte kultura kaj intelektuala.

Kiam nuntempe oni konstruas la Eŭropan Unuiĝon kaj stariĝas plenakre la problemegon de la lingva diverseco, kiu malebligas la integriĝon de siaj membroj, la eŭropaj institucioj kaj la estraroj kiu ilin subtenas, elektas la plej nelogikan, neracian kaj nerealigeblan solvon —estu lernataj kiel eble plej multe da lingvoj!— jam antaŭ 100 jaroj S^o Codorniú diris kiel solvi la problemon: Ĉiu popolo kun sia lingvo, kaj la supranacia Esperanto por ĉiuj. Tiu ĉi ripenso estas evidenta konstato, natura, ĝi estas klara kiel akvo, kion multaj ankoraŭ ne kapablas kompreni.

Estas surprizo, ke la nomo de Codorniú kaj sia verko estas persistade silentigitaj de tiuj, kiuj devis esti gardantaj viva liajn nomon kaj verkaro kiel ekzemplojn por venontaj generacioj. Tial ne estas surprizo, ke Murcia donis al parko la nomon de Camilo José Cela, persono tute ne ligita al Murcia, dum S^o Ricardo Codorniú restas la plej bedaŭrinda forgeso fare de tiuj kiuj plej lin ŝuldas: la murcianoj.

Mi konkludas, dirante ke la du pasioj de S^o Codorniú, la ekologio kaj Esperanto, pasioj kvalifikitaj de majoritato kiel utopioj, estis ekpraktikataj de tiu ĉi genia viro, pru-

vante ke la utopioj estas realigitaj kiam oni kredas je ili, kaj ne sufiĉas sole babilado; —tre ofta praktiko niatempem— sed ke nepras dediĉi sin tutkorpe kaj tutanime solvi la problemojn kiujn havas la homaro.

Servu kiel komplementon de la bonega libro *La malnova arbo* de la amiko Enrique Morales, kaj kiel omaĝo al la 150^a datreveno de la naskiĝo de S^o Codorniú, ke la 55^a Nacia Hispana Kongreso de Esperanto okazos en Murcia dum la monato de julio, kaj ke antaŭ du monatoj en tiu ĉi salono CajaMurcia ni kalkulis kun la partopreno de Nobelpremiito pri ekonomio de la pasinta jaro, la germana profesoro Reinhardt Selten, kiu prelegis en Esperanto. Sendube, S^o Ricardo



Oni legas je la statuo: Murcia al Ricardo Codorniú. Apostolo de l' arbo - Oktobro de 1926. .

Debatindaĵoj

K.F.D.

Dudek kutimaj demandoj pri Esperanto kaj siaj respondoj

Kutime geesperantistoj devas senofendiĝi kiam ili aŭdas stultaĵojn pri Esperanto. En la kajero de aprilo ni jam respondis la unuan demandon (*Kio estas ESPERANTO?*) Se vi havas alian respondon, ni ege ŝatus ekkoni ĝin. Nun ni respondas la duan:

2. Se Esperanto estas tiel bona, kial ĉiuj ne jam adoptis ĝin tra la tuta mondo?

La kaŭzoj estas ekonomiaj, kulturaj, politikaj, sed ĉefe pro misinformaĵoj volantaj kiuj atakas ĝin de antaŭ ol jarcento.

a) *Ekonomiaj*: la lingvo altrudita al resto de la mondo (hieraŭ la franca, hodiaŭ la angla, morgaŭ eble la germana aŭ la japana) donas al sia originlando grandan kvanton da mono kiel kopirajtoj de filmoj kaj libroj. Ankaŭ ili disvastigas kutimojn kaj vivmanierojn kiuj kreas bezonojn por apartaj varoj, kiel *drelikaj* pantalonoj kaj *Coca Cola*, kio faras monon por la metropolo.

b) *Kulturo* apogas sin sur la lingvo, kaj angl-usona kulturo plej disvastiĝis tra la mondo tiel, kiel oni vidas sur niaj televido, el kie ni lernas pri la problemoj de loĝantoj de Novjorko aŭ Kalifornio pli ofte ol pri tiu de Kjoto, Katmandu', Addis Abeba aŭ Tijoco de Abajo (Tenerifo).

c) *Politikaj*: oficialaj informaj kanaloj fluas unudirekten: supre mal-supren. Modo, plaĉoj kaj pensmanieroj ĉiam venas el la angla mondo, ekcepte pri sengravaj aferoj. Informado estas povo, kaj tiu, kiu kontrolas informadon, povas kontroli la onian opinion kaj pensmanieron de tutaj nacioj. Se mi povas paroli iulingve tiel facile kiel hispane kun amiko de Persio -ekzemple- kiu regas saman lingvon tiel facile kiel la araban, ĝi estus alte danĝera por ĉiuj, kiuj timas veron, ĉar mi alproksimiĝas multe al lia kulturo kaj tial repensas multajn oficialajn "verojn" kaj la supozita supereco de la manieroj okcidentaj por pensi kaj vivi eble prezentus alian vizaĝon, malpli dezirata ol oni kutime opinias, ĝenerale. Se malmultaj el ni povas fari tion, ne gravas al povuloj okcidentaj, ĉar estas nur kelkaj lunatikoj kiuj lasis la ŝafaron. Se ni ĉiuj farus tion, multaj politikoj devus refariĝi -ĉefe tiuj tuŝantaj la Trian Mondon-, ĉar kiam oficialaj mensogoj kolizias realajn vivaĵojn de personoj, ili reagas kontraŭ siaj eldirantoj.

d) *Etikaj*: la Leĝo de la Plej Fortulo ne toleras, ke aliuloj tenu decidan povon. Se ĉiu popolo el la Tero estus aŭskultita, ne estus tiom da diferenco inter Nordo kaj Sudo. Ĉe Unuiĝintaj Nacioj oni povas aŭskulti ĉiujn landojn, sed nur en iu el la sep povaj lingvoj, kiuj marĝenigas kaj disriminacias la aliajn DU MIL

NAŬ CENT NAŬDEK TRI! Oni esprimas ekzakte tion, kion oni volas diri en la propra lingvo tiel bone, kiel en neniu alia lingvo, kaj se necesas diskuti aŭ lukti por propono aŭ amendo, pli taŭgas sia lingvo. Tiu estas la plej granda malbono ĉe UN kaj kion la Eŭropa Komunumo volas eviti pere de sia ĥimera plurlingva plano, kiu englutas tri kvaronojn de budĝeto. Kiam la eŭropaj moŝtoj estas finintaj paroli, restas malmulte da mono por fari tion, kion ili diris, ke ili faros, ĉar ili jam elspezis preskaŭ ĉion havebla por traduki sian babiladon... Fakte, la ekskluziva uzo de la angla por internaciaj rilatoj jam produktis la nedezireblan rezultaton konsideri kondamneblan ĉion neanglan, ekzemple uzo de vizaĝvualo de la muslimaj virinoj, aŭ hindaj turbanoj,



kiuj estas tiel religieme respektindaj, kiel geedza fido aŭ karitato kristana. Se ĉion ĉi oni povus pridiskuti egalnivele kaj kamarade de diverskulturaj personoj, la aktuala doko elfalus, ĉar informo ne plu filtriĝos de tradukistoj, intepretistoj kaj novajagentejoj kiuj cenzoras -konscie aŭ nekonscie- tiujn, kiujn ili trasendas laŭ kelkaj kreitaj interesoj, inter kiuj siaj inter-ista intereso ne estas la plej malgranda...

Tial neniu lando investas eĉ unu peseto por helpi disvantiĝon de idiomato facila, fidebla kaj demokratia, kiu respektas la rajton de landuloj por paroli tiel ajn, kiel ili volas. Daŭriĝi centjaro kaj esti parolata tra la tuta mondo estas garantio ke, fakte, Esperanto ja estas bonega.

*Kompilita kaj reverkita de
Olga López*



Labormondo

Kio okazas kiam eksterlandano volas labori en Hispanio?

La eksterlandanoj rajtas labori en Hispanio laŭ la kondiĉoj fisksitaj de la superleĝo 7/85^a, aprobita la 2^{an} de julio, kiu temas pri la rajtoj de la nehispanoj en tiu ĉi lando.

Tiu superleĝo en sia 3^a artikolo regulas la laborrajtojn de la eksterlandanoj. La startopunkto stablita tiurilate de la leĝo estas la nepreco por la eksterlandanoj; celantaj labori ĉi lande, atingi samtempe laborpermesilon kaj loĝadpermesilon, ambaŭ iloj havante similajn longdaŭron, t.e., 5 jarojn, sed ĉiun el ili devas doni malsama ministerio.

La loĝadpermesiloj koncernas la Ministerion pri Internaj Aferoj, dum la laboraj koncernas la Ministerion pri la Laboro kaj Socia Asekursistemo.

La leĝo faras ekceptojn por la atingo de laborpermesiloj por la civilaj kaj armeaj eksterlandaj administracioj samkiel por la raportistoj de amaskomunikiloj fremdlandaj, la religiaj ministroj de la malsamaj konfesioj, la artistoj alvenontaj al Hispanio kaj la devenantoj el Gernezeo...

La koncesio de laborpermesilo estas subordigita al la prezento de skribita laborkontrakto, fare de la petanto; aŭ anstataŭe al perdokumenta pruvo de la kompromiso de entrepreno dungi ĝin. Se por la laborposteno oni bezonas specialan titolon, k.e., la kuracistoj, estas nepraĵo, ke tiu titolo estu revalidigita antaŭe.

Se la eksterlandano deziras labori por si mem, kiel entreprenisto, ĝi devas pruvi, ke ĝi jam estas petinta la rajtigilojn postulatajn de la tiama reganta leĝo por la naciatio.

Ĉar la laborofero tute dependas de nestabila merkato, kelkfoje la plena dungado estas malebla; jen la nuna situacio en Hispanio.

La administracio prijuĝas la jenajn cirkonstancojn por decidi pri peto de laborpermesiloj:

- a. La ekzisto de hispana sendungaj laboristoj en la branĉo kie intencas labori la petinto.
- b. La nesufiĉo de hispanaj laboristoj por okupi la postenojn celatan de la petinto.
- c. La reciprokeco pri tiaj laborpermesiloj ekzistanta en la lando el kie devenas la eksterlandanoj petintaj.

Nu, laŭ la menciitaj prikonsideroj, la administracio povas rifuzi laborpermesilon, tamen kiam la peto estas por farigi entreprenisto, oni favore pritaksas ĝin, se la projekto de la petinto implicas la kreadon de novaj laborpostenoj aŭ produktado de varoj kapablaj kuraĝigi la kontraktojn merkatajn de la laboristoj kaj ankaŭ se la varoj aŭ servoj alportitaj estas kapablaj plibonigi la naciajn vivkondiĉojn.

Fine, se iu ajn entreprenisto dungas eksterlandanojn ne atinginte la koncernajn permesilojn, ĝi faras malobservon, po ĉiu homo tiel dungita de ĝi. Krome, tiaj malobservoj estas konsiderataj kiel gravegaj.

Juan Antonio Cabezas Martínez

Recenzoj:

Labortistaj Kronikoj pri la Hispana Esperanto-Movado, de Antonio Marco Botella.

La libron la aŭtoro verkis jene: elstaraj verkistoj el diversaj landoj de nia movado publikigis de tempo al tempo paĝojn el la historio, kiujn ni, laboristaj esperantaj hispanoj, vivis en pasintaj tagoj. Je 1993 oni organizis Esperanto-ekspozicion ĉe la Valencia Kongreso, fare de la *Fritz-Hüser-Instituto de Dortmund*. Tie ni vidis esperantaĵojn pri germana kaj eksterlanda laborista literaturo. Oni eldonis tiam, kiel prezento de la ekspozicio, la libron ***Ilustrita historio de la laborista esperanta movado***, en kiu aperas kelkaj paĝoj sub la titolo *Esperantistoj en la hispana intercivitana milito*, majstre verkitaj de Ulrich Lins. Ni tuj diru, ke verkoj pri la hispana intercivitana milito abundas en ĉiuj lingvoj, sed neniun monografion oni konas pri tiu hispana revolucio kaj aliaj ĝeneralaj aspektoj sociaj kaj politikaj de la hispana Laborista Esperanto movado, verkita de esperantisto vivinta tiujn dramajn epizodojn. Ŝajnis pli on necese, ke homo el tiuj generacioj ankoraŭ vivaj klarigu al ni siajn proprajn spertojn, priskribante tiujn historiajn paĝojn...

Marco Botella informas en sia verko pri datoj, nomoj de la unuaj pioniroj kaj eventoj de la movado. La verko konsistas el du elementoj esencaj: unu kiu prihistorias la naskiĝon kaj sekvajn plej elstarajn epizodojn de la laborista movado esperantista en Hispanio, kaj alia kiu priskribas paralelan proceson pri sama esperanta movado en la mondo, indikante influojn kaj interrilatojn, la ideologian malvolvon en unu kaj aliaj lokoj kaj la plektiĝon de ambaŭ en la kadro de la ĝenerala laborista esperanta movado. Ne povus ĝi esti alimaniere, ĉar

la hispanan esperantistan laborismon oni devas konsideri nur kiel parton de tutmondeca movado, sen speciala emfazo al patriotismaj lokaj vidpunktoj kaj konservante la karakteron sennaciecan, kiu devas ĉiam distingi esperantistan laboristan movadon, ne gravas en kiu teritorio ĝi malvolviĝas.

Multajn aludojn la aŭtoro dediĉas al individuoj sen kies pasiaj agado kaj sinoferemo tiu laborisma esperantomovado ne povus ekzisti, nek tiu ĉi verko interesi la laboristaron. Atentindas la politikaj profiloj de *don Juan Régulo Pérez*, apenaŭ nun konata en la movado (malgraŭ sia monda prestiĝo), aŭ viglo de *Luis Hernández Lahuerta*, antaŭ, dum kaj post la milito; impresas la rakontoj pri la tiel nomita *tragika semajno de Barcelono* kaj la murdo de Andreo Nin en Madrido, la sovaĝa bombardo de Gernika aŭ la dramaj torturoj al ekzilitoj en nordafrikaj koncentrejoj...

Gravas ankaŭ substreki la entuziasman idealismon de esperantistaj grupoj kaj individuoj dum la jaroj tridekaj, kaj studinda estas la fenomeno pri naskiĝo en Hispanio. Kaj tio kontrastas kun la aktualaj momentoj, absolute orfaj de belaj homamaj idealismoj...

Ni rekomendas la libron al amantoj de historio, sed aparte al la gekamaradoj de la diversaj LEA-oj. La prezo ne estas alta (1200 pesetoj) kaj la intereso garantiita.

Rosa Onofre

Vizito de Nobelpremiito al Murcia

II: La Prelego

*Kiel ni jam diris pasintnumere, Profesoro Reinhardt Selten unufoje prelegis **esperante** al ĝenerala publiko je la 6^a de marto de 1996 en Murcia. Tio estas la unua fojo kiam oni faris tion. **Kajeroj el la Sudo** estis tie, kaj ni prenis la prelegon. Ĝi estis jene:*

Dankon pro afabla enkonduko. Antaŭ mi parolos pri *Teorio de Ludo* mi devas enkonduki iom malrapide por preni la malfacilaĵojn klare.

La historio de Ludo Teorio ampleksas 50 jarojn, kaj naskiĝis fare de John von Newman, kvankam ĝi estis nomumita antaŭe.

Kio estas Ludoteorio?

Matematike modeliĝas kaj analizas celkonforman interagon en konflikto kaj interago. Oni trovas aplikadon ĝian en konduto kaj homa kaj besta.

Kion Ludo-teorio ne traktas?

Kiel gajni ludante ruleton, kiel riĉiĝi per bona spekulado, kiel bone ludi ŝakon aŭ pokeron. Tio estas, ĉar jam ekzistas difinitaj reguloj kiujn la ludantoj ne povas ŝanĝi, sed ili devas obei.

Se la Ludo Teorio ne povas fari tion, kion ĝi povas fari?

Ĉefe por analizi ĝeneralajn konkludojn pri la logiko de

strategia interago. La pli grava estas apliko al teorio kiu modeligas sciencojn kiel ludan matematikon kaj analizan teĥnikon. Sed ankaŭ oni povas apliki ĝin al ekonomiteorio, politikoteorio, militisma kaj biologia evoluteorioj...

Ekzemplo

Kvantovaria oligopolo sen kostoj. Estas merkato en kiu estas tri firmaoj. La Unua, la Dua aŭ la Tria povus produkti la kvanton, kiu povas esti de 0 al 20. Kaj ĉiu firmao produktas, aŭ parton aŭ nulon. Por simpleco, oni ne konsideros la kostojn. La gajno estas kvanto



La tradukisto **Alonso Núñez** -maldekstre- ripetas hispane la esperantan prelegon pri lud-teorio.

multobligita de la prezo (kvanto*prezo). Imagu, ke ĉiuj vendas malsame. Ne gajnis tiu, kiu havis plej kvanton, sed estas pli konsideroj. Ekzistas eraroj kiuj damaĝas la erarantojn pli ol aliaj. Oni povas demandi sin kiu estas la plej bona maniero por agi. Se firmao atingas la 33% de la merkato, ĝi faris plej bone, ĉar oni ne povas superi 100%, kaj 33% estas tute atingebla.

Se tiu analizo estas korekta, oni povas fari konstaton, sed oni ne scias tion, kion la konkurenco faros.

Kiam unu scias, ke oni traktos fari 33%, li povas fari pli ol 33%. Sekve, la peljbono estas, ke ĉiu faras 33%, ĉar neniu povus fari pli ol tian procenton. Tia situacio, 33% por ĉiuj, estas la *ekvilibra situacio*.

Ekvilibro estas mem-stalibiliga ĝenerala rekomendo, kaj devio ne estas avantaĝa se ĉiu alia sekvas la rekomendon.

Konkludoj

La plej sukcesa ludanto ne necese estas tiu, kiu havas la plej bonan strategion. Eraro povas damaĝi aliajn bonajn ludantojn pli multe ol la reston.

Ekzemplo de ekvilibro:

Ŝtelisto kaj gardisto

Ŝtelisto povas ŝteli aŭ resti hejme. La gardisto povas gardi aŭ dormi. Se la ŝtelisto ŝtelas kaj la gardisto dormas, la ŝtelisto povas labori. Se la gardisto laboras, la ŝtelisto iras al malliberejo. **La prozeso estas:** se ŝtelisto ŝtelas, la gardisto dormas malplie. Sekve, la ŝtelisto povas labori malpli. Tial la

gardisto dormas plimulte, ĝis la ŝtelisto povas ŝteli tiom, kiom antaŭe, sed plue la ŝtelisto povas rabi pli kaj la gardisto dormos malpli. Por rompi la prozeson, oni devas puni plie la gardiston. Tiu dormos malpli, sed la ŝtelisto rabas malpli ofte. La probable de la ŝtelo ne dependas de la movo de ŝtelo, sed de la potenco de la motivo de la gardisto.

Tio estas grava leciono: ke *ne ĉiam oni obtenis la celon, kiun oni volas*. Oni devas analizi la profundajn kaŭzojn.

Ripetado ŝanĝigas la ludon

Estas dupolo: firmaoj Unu kaj Du. La prezoj malsamas. Se la prezoj estas egalaj, la firmaoj havos dividon de la merkato. Alie, la pli malalta en prezo ricevos la tutan profiton:

Plej alta prezo	Tuta profito
A	10
B	6
C	2

Se la prezo egalas, la profito egalas. Alie, la plej malalta preza firmao ricevas la tutan profiton.

Unufoja ludo

Ekvilibro povas esti BB kaj CC. Se ĉio estas A, ne estas ekvilibro: iu ricevas 5, sed se B devias, ĝi devias 6. Se ambaŭ ludas, la devio estas 2. Cc donas alian ekvilibron, ĉar ĉiu obtenas bonon 2, kaj se iu devias 1, la alio devias al 0.

Se oni ludas du fojojn

Nova ekvilibro en la duperioda ludo:

Periodo	Ekvilibra strategio	Pago	
		Ekvilibro	Devio
1	A,A	5	6
2	B,B C,C alie	3	1

Kiam ne ekzistas alternativo unufoje, ekestas je la dua ludo.


Se ludas C,C anstataŭ B,B, la gajninto estas 1, kaj ne estus profitdono.

Fenomeno de signalado

Signalado estas nomo elpensita de Spencer en 1973, kaj en 1975 Zahari renomis ĝiel kiel *handikapiraĵo*. Priskribo: en kelkaj partoj oni konkurenças pri egaj ignamoj. La afero ne havas avantaĝon ekonomikan. La kialo estas, ke se viro sukcesas kreskigi la plej altan ignamon, li ricevas grandan prestiĝon kaj pozicion. Se viro povas obteni grandan ignamon, li estas bona agrikulturisto. Eĉ se la procezo celas nur kreskigi egan frukton, la afero estas farinda, ĉar ĝi montras grandan laboreblecon.

Simile okazas en Samoa: viroj suferas vole dolorajn operaciojn tatuajn. Tiel ili *montras* bonajn kvalitojn por milito, ĉar li toleras doloron. Eĉ hodiaŭ ili portas la tatuajojn pri la indeco de familiestro. En ambaŭ kazoj kio gravas estas la kapablo por sendi (aŭ ne sendi) signalon. Viro kiu portas tatuajojn, montras ke li toleras doloron.

La produktiveco dependas de la signalkapablo. La merkata valoro de p kaj p' estas la meznombroj. La ekvilibro



estas p'', kiel la kostoj egalas la kostojn de la aliaj. Maldekstre el p'' ĝi ne estas utila, sed dekstre ĝi jam estas.

Spencer aplikis tiun teorion al edukado. Oni povas havi cinikan vidon pri edukado universitata, ĉar ĝi estas utila por elsendi signojn: ne gravas tio, kion oni lernas hje la unversitato; kio gravas estas, ke io ajn oni lernas tie *estas malfacila*. La mesaĝo kiun la universitataj studentoj elsendas estas, ke ili eblas fari ĝin. Mi, kiel univerzitata profesoro, esperas ke tio ne ĉiam estu vera! Tamen, tiu teorio ne estas tute malvera...

Je biologio

Ni ĉiu scias pri virpavo, kiu havas multe da plumoj, sed subteni tian plumaron bezonas multan energion. Nur viroj pavaj produktas tiujn belajn plumajn. Pere de la plumaro ili signalas pavinojn, ke siaj genetica materialo estas bona, ĉar ili havas sufiĉe da sano por subteni ĝin. Aliflanke, havi tiun plumaron estas




malavantaĝo por la virpavo.

Projektado de meĥanismoj

Usona aŭkcio de radiofrekvencoj en 1994; mallarĝaj bandoj por persona komunikado. Tiu, kiu volas aĉeti frekvencon, devas havi ĝin ĝenerale. La bezonoj de la aĉetantoj estas tre diversaj. Ĉiu fojo kiam iu ofertas, li povas fari proponon por ĉiu frekvenco. Tamen, neniun frekvencon oni vendas ĝis la fino. La aŭkcio finas kiam ne plu estas oferta.

La procezon ilustras la jena grafikaĵo:



La spertoj esperis atingi nur 50 milionoj maksimume. Sed oni obtenis 617! Estas alia klarigo: homa konduto ne estas tiel rigida kiel estas espereble.

Priskriba ludoteorio

Norma ludoteorio analizas strategiajn problemojn supozante planan raciecon.

Homaj kapabloj de pensado kaj kalkulado ne estas senfinaj. Tial homa racieco estas limigita.

Homaj motivoj estas malpli monolitaj ol ni kutime supozas en ekonomia teorio.

Esplorkampoj: lernprocezoj en ludoj. Alidirektitaj motivoj. Strategia pensado.

Reciprokeco: mi traktas vin kiel vi traktas min. Limigita reciprokeco deformas tion, kion signifas specifa situacio.

Devas esti situacio por diskrimini kiel oni traktas min. Tiam estas limigita la teorio racie. (Ŝuldita al Güth kaj aliaj en 1982.)

Ultimatoludo

La ludanto A proponas dividon de 100. La ludanto B aŭ akceptas, aŭ ne akceptas. Se ne, ambaŭ ricevas nenion. Solvo povus esti, ke ludanto A ricevas 99 kaj B nur 1. Se B ne akceptas, estas ribelo kontraŭ ekspluatado, t.e., negativa reciprokeco. Oni faris la eksperimenton dividi \$100 po du ludantoj, kaj la propono estis \$70 al la A kaj \$30 al la B, kiu tute rifuzis kaj lasis la ĉambron. Estis li persono tiel fierca, ke ne komprenis, ke oni volis **donaci** \$30 al li!

Estas ege domaĝe, ke ĉar la tradukado ne estis samtempa, sek sekva, mi ne povis diri pli al vi pro manko da tempo...



Aliaj Anaroj:

La RADE (Rotaria Amikaro De Esperantistoj)

Rotarian Asocion fondis Paul Harris, usona juristo, celante nutri la *idealon servan* kiel bazo de entrepreno, por ekhavigi altan etikan kodon en negoco kaj profesio libera, kaj patronigi mondan kamaradecon ene de negoculoj kaj profesiuloj. La nomon *Rotary* klubo oni adoptis, ĉar kunvenoj estis *rotacie* en la oficejoj de la anoj, tio estas, ĉiam ŝanĝante la kunvenloko.

Paul Percy Harris kaj Ludoviko Lazaro Zamenhof

La unua kunveno de Rotari-klubo estis je la 23^a de februaro de 1905 en Ĉikago (Usono), kio estas koincido kun la unua Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer (Francio). Zamenhof estis pli jaraĝa ol Paul Harris, sed ambaŭ homoj havis similajn idealojn: internacian interkompreniĝon, pli bonajn rilatojn inter la homoj kaj ankaŭ universalan pacon.

Ni bone konas la pensadon de Zamenhof: li forte amis homaron kaj pensis, ke ĝi ĉesos interbatali se ĝi povus facile kaj rekte interkompreni. Unuavice, Rotario ne aspektas tiel idealista, sed, kiam oni atente legas la verkojn de Paul Harris, bedaŭrinde elĉerpitaj, oni komprenas, ke li ankaŭ estis forte motivita de amo por homaro kaj konvinkita, ke interkompreno inter la popoloj kondukos al ĝenerala paco. Inter siaj pluraj verkoj, *This Rotarian Age* (Tiu ĉi Rotaria Epoko) enhavas multajn paraĝafojn kontraŭ milito.

Inter la mondmilitoj, Rotario Internacia plurfoje rezoluciiis favore al Esperanto, ĉefe en 1932, kaj unu el siaj Prezidantoj, la franca Maruice Duperrey, estis konata esperantisto. La brita revuo *The Rotary Wheel* (la rotaria rado) ofte publikigis specialan 20 paĝan kajeron pri la lingvo internacia. En 1942, rotaria konferenco okazis en Londono, Britujo, sub prezidenteco de Sudney Pascall, eks-Prezidanto de Rotario Internacia. Inter aliaj interkomprenigaj projektoj estis proponita la instruado de Esperanto en elementaj lernejoj. Tiu konferenco estas rigardata kiel al antaŭ-kunveno de UNESKO.

Sed Paul Harris neniam aludis al Esperanto en siaj verkoj, nek al interkomprenigaj problemoj. Tamen, li multe vojaĝis tra la mondo, inter 1928 kaj 1937. Tiel lia pensado plilarĝiĝis per renkontoj kun aliaj popoloj. Sed, ŝajne, la nura uzado de la anglo-usona lingvo ne tro malhelpis lin. Malgraŭ tiu nescio, Paul Harris multe lernis de aliaj landoj, kaj sia kulturo ne restis nur usona. Ekzemple, li skribis en *This Rotarian Age*, ke la eŭropanoj, malsimile al usonanaoj, ne konsideras monon kiel estas la ĉefa celo de la vivo. Ilia sinteno koncerne la rilatojn inter la aferoj kaj la vivo estas pli sana ol la sinteno de usonanoj.

Profete, li ankaŭ opiniis, ke en la estonto, libera tempo estos multe pli longa ol labortempo. Edukado ne plu devos nur prepari al profesia vivo, sed

ankaŭ organizado de libertempo. Do la homoj havos multajn ŝancojn renkonti kaj rilati kun malsamlingvanoj, malsamkulturanoj.

Fakte ni konstatas, ke la profetaĵo de Paul Harris estas nun ĉiutaga realaĵo. Kiel komerco kaj produktado, libertempaj vojaĝoj kaj distraĵoj estas mondskalaj. Sed tro multe da turistoj aŭskultas nur sian gvidiston kaj ne rilatas kun la popoloj de la vizitataj landoj.

Rotario Internacia uzas kvar *oficialajn lingvojn*: angla, japana, hispana kaj franca. Aliaj landoj ŝatus, ke siaj lingvoj ankaŭ oficialiĝu. Rotario certe ne povas, kiel OUN (Organizado de Unuiĝintaj Nacioj) uzi dekon aŭ dudekon da lingvoj. Tio estus ege multekosta. Do, RADE esperegas, kaj proponas, ke iam Esperanto fariĝos oficiala lingvo por rotariaj rilatoj. Ĉar ĝi estas neŭtrala, kaj facile lernebla, la peto por uzado de pluraj lingvoj ĉesos kaj Rotario ŝparos multe da mono. Tiel, finfine, la pensoj de Harris kaj tiuj de Zamenhof renkontiĝos.

RADE estas la plej malnova Rotaria Amikaro

Laŭ la *Rotaria Baza Biblioteko*, historio de rotariaj amikaroj komencas en 1947, kiam kelkaj britaj notariaj jaktistoj decidis kune praktiki jaktadon kaj flirtigi la rotarian flageton sur siaj ŝipoj. Baldaŭ, usonaj jaktistoj imitis ilin kaj "flotoj" organiziĝis.

Sed, antaŭ nelonge, oni malkovris ekzempleron de n° 8 de *Mondamikeco*, oficiala bulteno de Rotaria Esperantista Amikaro, datita je oktobro 1931. Tiu 12 paĝa presita bulteno mencias la kvaran

ekzistadan jaron de la Amikaro, kiu do estis fondita en 1928, en Anglujo kaj Francio. Tiu rotaria amikaro, regule konstituita, jam kapablis kunveni 12 delegitojn de pluraj nacioj dum la Internacia Rotaria Kongreso en junio 1931 en Vieno, Aŭstrio. Ĝi do sendube estas la unua Rotaria Amikaro, 19 jaroj antaŭ tiu de jaktistoj.

Organizado de RADE

Ĉar RADE anaro estas multnombra kaj disigita ĉirkaŭ la mondo, malfacile estas kunveni ĝin aŭ renkontigi la membrojn. Do, ĝis nun okazis neniu balotado por elekti estraron, aŭ decido pri iu kotizo. Dum multaj jaroj Prezidanto Graham Leon-Smith regis la asocion, organizis budojn ĉe Rotariaj Kongresoj, kaj nun S° Mark Levin, el Francio, estas la Ĝenerala Sekretario.

Marc Levin



...el la paĝo 11

Mendkodo	BROŜUROJ DISPONEBLAJ	
	Titoloj (aŭtoroj)	Pesetoj
FZ.	Filozofio Zoologia (Lamark)	625
HI.	Historio pri la skismo (SAT, 1930/31)	125
HO.	La Evangelio de la Horo (Berthelot)	250
IK.	Instrui E ^o m por komuniki (Samain)	125
IN.	Individualisma socialismo de A.R.	
	Protschowsky	50
JA.	Jaro 2000 (H. Muller)	875
KA.	Kancero kaj Ekologio (M. Touchasi)	375
KB.	Kie brulas, ĝentlemanoj? (Bokowski)	500
KE.	La Kvina Evangelio (Han Riner)	625
KI.	El la kara infaneco... (Valo)	500
KO.	Kongreso de Popoloj (Mondcivitanoj)	875
LA.	Lingvaj anguloj (Baronnet)	625
LEK.	La eta kato kiu ne volis morti	125
ŝLK.	La Konfliktoj (Le Dantek) + Dubi (alain), tr. Lanti	625
ŝLL.	Leteroj de Lanti (ĝis 1937)	1250
LM.	La Mondo ne havas atendejon (Dekker)	500
L.R.	La Ribelo (Joseph Roth), romano	500
ME.	La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon)	125
MM.	Migrante tra metioj (Valo), aŭtobiografio	625
MN.	Ĉu militista defendo estas kredebla? (Laserre)	150
MS.	Memvola Servuto (La Boétie)	125
NA.	Naciecaj problemoj (Rosa Luksemburgo)	250
NC.	Naciismo (Lanti)	300
NI.	Nia individuismo (Armand)	130
NL.	Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo	75
NT.	Ne tiel, sed tiel ĉi (Faulhaber)	375

Mendkodo	BROŜUROJ DISPONEBLAJ	
	Titoloj (aŭtoroj)	Pesetoj
ŝPA.	Pensoj de Paskalo (ekstraktoj)	500
PC.	Parabolo pri la cisterno (Bellamy)	125
PI.	La rajto de pigro (Paŭlo Lafarge)	250
PK.	Poemoj de Omar Kajam (Tr. Waringhien)	375
PL.	Esperanto kaj literaturo (R. Laval)	125
PR.	La poemo de Rodano (F. Mistral)	750
PS.	Psicotransformismo (Ergoto de Bonaero)	125
ŝRK.	Rakontoj (Franz Kafka)	375
SK.	Kio estas Socikredito?	75
SS.	Sindikatismo. Sovetoj (A. Pannekoek)	125
ŜG.	La Ŝtona Gasto (M D Goninaz, teatro)	125
TC.	Por Tutmonda Civila Ŝtato	125
TM.	Tra la mondo per biciklo kaj esp.	625
TP.	La Turo de l' Popoloj (H. Riner)	750
UN.	Unu aŭ nu! (Guy Marchand)	750
US.	Unueco super prokreda dividiĝo	75
VH.	Ĉu ni vere helpas la trian mondon?	375
ŝVLI.	El verkoj de Lanti I: <i>For la neŭtralismo!</i> <i>Laborista esperantismo. Absolutismo. Herezulo.</i> <i>Herezajo. Adamajoj.</i>	1000
ŝVL3.	El verkoj de Lanti III: 1937-1946	750
VO.	Vortoj de kamarado E. Lanti	500
	El verko de Leo Tolstoj	250
ZH.	La Zamenhofa Homaranismo	125
ALDONE,	po 1:	
	Individuisma Manlibreto (H. Ryner)	125
	Mia Vivo (Bartelmes)	200
	Politika neperforto	150
	Rompoj	100

NOTO.- La mendkodoj prefiksataj kun ŝ estas ŝaldantaj.

Ni estas en la reto!

Kajeroj el la Sudo kaj la nova hispane verkita magazino **El Correo del Esperanto** havas *elektronikajn versiojn* ene de Internet. Fakte, ambaŭ versioj estas tiel similaj, ke nur mankas paperon en la nova versio! Ĉiu artikolo estas tie, kaj eĉ fotoj. La venonta fojo kiam vi sendos artikolon al ni, vi devas agnoski, ke vi estos legita tra la tuta mondo pere de Internet. Se vi volas scii tra vi mem, skribu al mia retadreso jesuo@mur.hnet.es, aŭ eĉ pli rekte, serĉu la paĝon <http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/espe.html>.

Se vi volas kunlabori, mi atendas vin rete kaj direkte. :-)

LA TAJFOREGNO DE MURCIA-II,

El *Lirikaĵ perloj de Al-Andalus*,

de Antonio Marco Botella

Ĉirkaŭ la jaro 1193, li komencis longan pilgrimadon, unue al Seviljo, Kordovo kaj Murcio, poste al la nordafrikaj urboj Bugio, Marrakeĉj, Aleksandrio kaj Kairo, kaj fine, en la jaro 1201, al Mekko, kiel li starigis sian plurjaran rezidejon. Li trovis tie poezian inspiron kaj verkis kolekton da mistikaj poemoj titolitan

Al-Turyuman al-Aswaq" (La inter-pretanto de la arda amo), kiu donis al li senliman prestiĝon kiel mistika poeto, sed ankaŭ malĝojojn sub vid-punkto religia, ĉar la imamoj de Alepo kaj kelkaj el siaj disĉiploj ne plene akceptis

certajn esprimojn de la poeto kaj montriĝis speciale kritikaj kontraŭ la lirika tono de la poemoj, pli proksima al fervora homa amo ol konforma al la mistikismaj doktrinoj.

Al tiuj malaprobaj opinioj Ibn Arabi respondis per nova eldono de la poemoj kun aŭtoraj komentoj, ofte vorto post vorto, indikante eĉ la sekretan mistikan sencon, kiun li volis doni al ĉiu esprimo. Tiusence li verkis jenajn versojn:

*Ĉio, kion mi mencias: tendoj kaj voja, o, homoj,
ĉio, kion mi komentas: li, ĝi, diroj aŭ riproĉoj;
ĉio, kion mi per versoj verkas pri doktrinvaloroj;
tio, kion mi esprimas pri aflikt' sub nubo-ploro,
aŭ pri la brilego splenda kaj ridet' de sun' kaj
floroj,*

*kiam klamas mi pri fu, o de kameloj sen celloko
aŭ parolas mi pri lunoj ĉe la ginece' el domoj,
aŭ pri sunoj, plantoj, brizoj, vent' kaj fort' de
fulmotondroj,*

*dunoj, vojoj kaj torentoj, ariatoj, montoj, boskoj,
junulinoj prezentantaj siajn mamojn kun allogo,
aperantaj kiel sunoj je la konfidenca horo...*

*ĉio, kion mi mencias pri sekretoj el la mondo
aŭ similaj fenomenoj, venas el la Dia gloro,
kaj de unu al l' alia iras al diversaj koroj*

*de la homoj sopirantaj
submeti, on al Diavolo,*

*Tia sankta priskribado nin
instruas en konkordo,*

*ke la vero mia havas ja paseon
kaj estonton,*

*tial devas vi disigi la eksteron
de l' verfonto*

*kaj en la interno serĉi la
aŭtentan homo-bonon!*

Denove Ibn Arabi vojaĝas tra diversaj landoj de Mez-Oriento en senlaca pilgrimado al sanktejoj,

kontaktoj kun piuloj kaj asketoj, kun saĝuloj aŭ tute simple por disvastigo de siaj sufismaj doktrinoj, ĝis la jaro 1223, kiam li decidis, verŝajne post invito de la sultano al-Malik (m. 1227), fiksi sian loĝejon en Damasko. Tie li finis, post intensa laboro, sian verkon *Kitab al-Futuhat al-Makkiyya* (Libro pri la revelacioj de Mekko), giganta verko konsistanta el pli ol 4000 paĝoj, en kiu li sinteze eskplikas siajn meditadojn spertojn kaj konkludojn pri la sufisma doktrino.

Daŭrigota...

Kajeroj _____ _____ el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461,**
E30080 MURCIA,
HISPANIO



Depósito legal: MU-798-1996
Presejo: Anka Ĉus'